

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Okazos

Hama-Ronda Tago en la 20a de aprilo

Ni havos prelegon kaj aliajn aferojn en la Muzeo Esperanto-Jokohama, nomata Hama-Ronda Tago. En tiu tago ni celebros la 10-jariĝon de nia Nefitocela Organizo Esperanto Jokohama, fondita en la 23a de aprilo 2015. La programeroj inkluzivas prelegon pri Kuroita Kacumi (1874-1946), japana pionira esperantisto. La libroj verkitaj de li troviĝas en nia muzeo, kaj ili estis ekspoziciitaj en la muzeo de lia hejmloko en la lasta jaro (Vidu nian n-ron por decembro 2024). La prelegonto estas s-ro Watanabe Tsuyoshi el Tokio, speciale studinta pri Kuroita en la studenta tempo.

Okazis

Vizitis korea esperantistino nian muzeon

La 8an de februaro vizitis nin s-ino Tamara el Koreio, kun ŝia edzo neesperantista, gvidite de ges-roj Kitagawa Ikuko kaj Hisasi el Kawasaki. Ni montris al ŝi la muzeon kaj ties kolekton, kaj ŝi interesite multe demandis nin pri la celo kaj administrado de la muzeo.



s-ro Kitagawa Hisasi

s-ino Tamara

s-ino Kitagawa Ikuko

Nekrologo

s-ro Makino Mitsuo (1930-2025)

La 17-an de februaro forpasis s-ro Makino Mitsuo, nia membro de 2006. Li estis muzik-instruisto ĉe elementa lernejo. En nia rondo, li i.a. gvidis kantogrupon. Li komponis “Kanto de Esperanto-Muzeo Jokohama”, “Kanto de Hama-Rondo” ktp.

Mia vojaĝo en Tsushima (1)

Landlima insulo kiu allogas koreajn turistojn

NAMBA Fumiharu



el Wikimedia

Antaŭparolo

En la oktobro 2024, kiam okazis la 3-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en Jeonju, post la kongreso mi vojaĝis en insulo Tsushima. Dum la vojaĝo mi spertis tre interesajn kaj eĉ unikajn aferojn multe. Kiam mi rakontis al rondanoj en Jokohamo kaj aliaj, oni rekomendis al mi skribi pri tiu vojaĝo en Esperanto. Nu, mi skribu antaŭ ol mi forgesos tiujn bonegajn impresojn.

Insulo Tsushima situas en markolo Korea (aŭ markolo Tsushima) inter Koreio kaj Japanio. La limo situas inter Tsushima kaj Busano, kaj internaciaj rapidaj ŝipoj ligas ilin per unu kaj duona horo. Lastatempe, tre multaj koreaj turistoj vizitas en la insulon uzante la rapidajn ŝipojn. Kaj kelkfoje sur ĵurnaloj aperas raportoj pri la turimo. Bedaŭrinde kelkaj malbonaj uloj ĝenas lokanojn kaj kaŭzas problemojn kaj disputojn.

Kial multaj koreaj turistoj vojaĝas al Tsushima? Kiel ili ĝuas en tiu landlima insulo? Mi havis intereson ne nur pri la insulo mem sed ankaŭ tiuj aferoj rilate de la koreaj turistoj. Tial, por mia reira vojo de la kongresejo en Jeonju al mia hejmo en Jokohamo, mi decidis viziti Tsushima per la rapida ŝipo same kiel multaj turistoj.

De giganta urbo al kvietaj fiŝkaptaj vilaĝoj

Matene de la 7a de oktobro, mi vekigis en la hotelĉambro de TOYOKO-Inn kiu situas tuj apud la stacidomo Busano. Post matenmanĝo mi iomete promenis ĉirkaŭ la hotelo kaj stacio. Lastavespera pluvo ankoraŭ daŭris iomete, tamen supozeble la vetero ne problemas por marveturo de rapida ŝipo.

Hieraŭ, la 6an posttagmeze, mi eliĝis de la kongresejo kaj trajnvojaĝis de Jeonju al Busano. Mi jam havis plurfojan sperton vojaĝi tiun urbegon Busanon. Estas tute giganta kaj amuza urbego, tamen pro la pluvo kaj laciĝo mi preskaŭ ne ĝuis vespervivon hieraŭ.

Jen, mi vojaĝu al nekonata insulo! Elirinte la hotelon, mi piediris al malantaŭa flanko de stacidomo, kaj celis al internacia terminalo de haveno Busano. En la terminalo mi tuj trovis ĝiĉeton por la ŝipo al Tsushima.

Tamen, la unua stranga afero atendis min. Kiam mi montris mian japanan pasporton, la oficisto hezitante demandis al la ĉefo por la maniero akcepti tiun pasporton. Supozeble, la oficisto estis novulo kaj ĝis nun tute ne traktis japanan pasporton!

Fine, sukcese mi ricevis enŝipiĝan biletan, kaj iris al la ŝipo same kiel multaj aliaj pasaĝeroj. Almenaŭ en mia rigardo, ĉiuj pasaĝeroj estis koreaj turistoj, kaj mi estis nur unu japano. Cetere, multaj signoj en la ŝipo estis skribitaj nur en korelingvo. Pasaĝeroj kiuj ĝuos vojaĝon gaje babilis en korelingvo atendante la ekveturon.

Je 9:10 antaŭtagmeze la ŝipo ekveturis. Sur la maro



ekstere de haveno la vetero estis iomete malbona. Skuo estis ne tre forta, tamen iom stranga ol normala ŝipo. Utiligante libertempon mi provis fari Duolington per mia telefono, tamen ĝi estis ne bona dum la skuado. Mi iomete sentis vomemon kaj ĉesigis telefonumon. Aliaj pasaĝeroj ankaŭ silentiĝis, kaj ĉiuj nur atendis la atingon al la haveno.

Feliĉe, la ŝipo normale atingis la havenon Hitakatsu je 10:40. Elirinte la ŝipon, la pluvo jam ĉesis en tiu kvietaj insulo. La terminalo de haveno Hitakatsu estas malgranda sed nova kaj moderna. En la pasporto-kontrollejo troviĝas trako por “Japanese”, tamen ĝi estas ne “nura” sed “prioritata”, kaj ĉiuj homoj en la trako havis verdajn (ne japanajn, sed eble koreajn) pasportojn.

“Bonvolu iri antaŭen!”

Iu maljunulo diris japanlingve kun bonkora voĉo kaj cedis lokon al mi. Li estas koreo kiu parolas japanlingvon flue. “Jen estas prioritata trako por japanoj, bonvolu!” Mi bone dankis kaj ricevis la kontrolon.

Post la pasporto-kontrolo atendas dogano. La doganistoj iomete miris ke japana vojaĝanto venis, kaj inspektis mian pakaĵon tre atente. Mi tute ne havis strangan aĵon, escepte de unu granda botelo de



“Moĵu”, loka alkoholaĵo en Jeonju kiun mi akiris kiel restaĵon en la bankedo de kongreso. Bone, la Moĵu estis ne problema. Kaj mi sukcesis eliri la terminalon. Ho, mi reiris mian hejmlandon Japanion! (Tamen, de ĉi tie al Jokohamo necesas pli ol unu tago...)

Apud la malgranda haveno Hitakatsu, estas kvietaj strato kun kelkaj butikoj. Laŭ la mapo, piede kelkcent metrojn troviĝas loka restoracio de suŝio. Ja, estas bona tempo por tagmanĝo. Mi promenis la straton kun mia pakaĵo. Laŭ la vojo estas kelkaj domoj, butikoj, kaj unu benzinejo. La prezo de benzino estis 198 enoj por unu litro. Nu, en la insulo estas multekoste...

Promeninte la straton, mi sufiĉe sentis kialon, kial multaj koreaj turistoj venas al Tsushima? Evidente! Nur per unu kaj duona horo de giganta urbo, oni povas atingi tian kvietan, pacan, naturplenan kaj ekzotikan insulon. Jen estas tre alloga loko por multaj koreaj popoloj.

Mi atingis kaj eniris en la suŝiejon. Miaj unuaj suŝioj en Tsushima estis tre bongustaj. Precipe, marangilo (japane: *Anago*) estas speciala fiŝo en Tsushima, kaj tiu suŝio estis vere bonega, simile kiel lerte kuirita omleto. En la manĝejo estis kelkaj turistoj alie ol mi, kaj ĉiuj ĝuis suŝiojn gaje konversaciante en korea lingvo. (Daŭre)




sezonvorto marta

Flava polvo 黄砂

Okita Kazumi

Flava polvo estas fenomeno, en kiu la sablo el la dezertoj de la interna regiono de Ĉinio estas levita de fortaj ventoj, portata de la okcidenta vento en la supra atmosfero kaj poste falas sur diversajn regionojn de Japanio.

Ĝi estas ĉefe observata en lokoj ĉe la Japana Maro fruprintempe, de marto ĝis majo.



Ĉerizarbo Mamnutristina (姥桜) el “Fantomrakontoj” (「怪談」)

Orig. de Lafcadio Hearn (Koizumi Yakumo, 小泉八雲) Trad. de Sibayama Zyun'iti

Antaŭ tricent jaroj^{(*)1}, en vilaĝo nomata *Asami-mura*, en la regiono *Onsen-goori* en la provinco *Iyo*, loĝis bonulo Tokubei. Tiu Tokubei estis la plej riĉa en la distrikto kaj la estro de la vilaĝo. Li havis bonan fortunon en plej multaj aferoj, sed atinginte la aĝon de kvardek, li ne sciis feliĉon esti patro. Tial li kaj lia edzino, afliktate de la seninfaneco, faris multajn preĝojn al la sankta loko de Fudoo^{(*)2}, la Reĝo de Vera Scio, kies fama templo estis templo *Saihoo-zi*, en vilaĝo *Asami-mura*.

Finfine, iliaj preĝoj estis akceptitaj. La edzino de Tokubei naskis filinon. La infano estis tre aminda, kaj estis nomita Tuyu. Ĉar la patrino lakto malsufiĉis, mamnutristino nomata O-Sode^{(*)3} estis dungita por la infano.

O-Tuyu^{(*)4} kreskis, fariĝinta tre bela knabino; sed je la aĝo de dekkvin, ŝi malsaniĝis, kaj kuracistoj opiniis, ke ŝi baldaŭ mortos. Tiutempe, la nutristino O-Sode amanta la knabinon O-Tuyu kun la amo de vera patrino, vizitis la templon *Saihoo-zi*, kaj preĝis al la sankta Fudoo, por la bono de la knabino. Ĉiutage, por dudek unu tagoj, ŝi vizitis la templon kaj preĝis. Kaj je la fino de tiu tempo, O-Tuyu subite kaj komplete resaniĝis.

Tial ĉe la familio de Tokubei estis granda ĝojo. Li havis festenon kun ĉiuj siaj amikoj celebrante la feliĉan okazaĵon. Sed je la nokto de la festeno, O-Sode subite malsaniĝis. Kaj la sekvantan matenon, la kuracisto alvokita prizorgi ŝin, anoncis ke ŝi baldaŭ mortos.

Tiam la familio, kun granda malĝojo, kolektiĝis ĉe ŝia lito, por diri adiaŭon. Sed ŝi diris al ili: “Estas tempo, ke mi malkaŝu al vi, kion vi ne sciis. Mia preĝo estis plenumita. Mi petegis la sanktan Fudoo, ke mi estu permesita morti anstataŭ O-Tuyu. Kaj tiu granda favoro estis plenumita je mi. Tial vi ne bedaŭru mian morton... Sed mi havas unu peton plenumotan. Mi promesis al la sankta Fudoo, ke por mi ĉeriz-arbo estu plantita en la ĝardeno de la templo *Saihoo-zi*, kiel dank-esprimo kaj memorado. Nun mi jam ne povas mem planti la arbon tie. Tial mi devus peti, ke vi plenumu tiun promeson por mi. Adiaŭ, karaj amikoj. Kaj memoru, ke mi estas feliĉa morti por la bono de O-Tuyu.

Post la funebro de O-Sode, juna ĉerizarbo, la plej bona el la troveblaj arboj, estis plantita en la ĝardeno de *Saihoo-zi* per la gepatroj de O-tuyu. La arbo kreskis kaj floris. Je la sesdeka tago de la dua monato^{(*)5} de la sekvanta jaro, je la dua mortodatreveno de O-Sode, la arbo floris en mirinda maniero. Tiel la arbo daŭre floras por du cent kaj kvindek kvar jaroj, ĉiam je la sesdeka tago de la dua monato. Kaj ĝiaj floroj, ruĝetaj kaj blankaj, similis al la mamoj de virina brusto rosanta kun lakto. Kaj la popoloj nomis la arbon “*Ubazakura*”, t.e. la Ĉerizarbon Mamnutristinan.

(*1) Tiu rakonto estis publikigita en 1901, do supozeble temas pri la jaro ĉ. 1600.

(*2) Fudoo estas Budhisma sanktulo, sanskrite Akalo. Japana plena nomo estas *Fudoo-myoo-oo*.

(*3), (*4) “O-” estas kares-prefikso al tiama virina nomo.

(*5) Lunkalendara februaro, t.e. nuna aprilo



eĥo el Aŭstralio

Koran dankon pro la sendado de via gazeto.

Mi bone komprenas la sintenon de Sibayama Noriko. En mondo, kie falsa novaĵo estas akceptebla, kie la trompoj en reklamoj estas akcepteblaj (ekzemple eblas skribi sur la etikedo “pura” se ne pli ol 5% de alia substanco estas en la varo) ktp... Mi opinias ke esti singarda estas tute racia kaj rekomendenda konduto.

Atendante la plezuro legi pli, Franciska Toubale